

**NIA VOĈO**  
**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4<sup>B</sup>-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**MARTO 2005**

### **NOVA DISSENDOLISTO**

**"esperanto\_madrیده"**: mem aliĝu ĉe [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrیده/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrیده/) aŭ sendante mesaĝon sen temo nek teksto al: [esperanto\\_madrیده-subscribe@yahoo.com](mailto:esperanto_madrیده-subscribe@yahoo.com)

### **FERNANDO DE DIEGO**

La aragona esperanta grupo "Frateco", je sia lasta asembleo aprobis proponi al HEF ke, ĉi jare, Fernando de Diego ricevu la kondiĉon de "honora membro" de HEF. La koincido de la "kiĥota" datreveno povas esti taŭga okazo.

Madrida Esperanto-Liceo plene apogas tion kaj petas al ĉiuj E-grupoj kaj membroj de HEF sendi apog-leterojn pri tiu propono al nia Federacio: [admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

### **"Nuevo método de Esperanto"** Lernolibro de F. de Diego.

Prezo: 7,52 EUR inkludas impostojn sed ne sendokoston. Rabato: 20% se vi aĉetas 10 aŭ pli da ekzempleroj. Petu al: Esperanto Liceo de Madrid. [admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

### **4-A CENTJARIĜO DE "EL QUIJOTE"**

Fundación Esperanto ricevis mesaĝon de Instituto Cervantes petante ekzempleron de la Inĝenia Hidalgo por sia Biblioteko kiu sidas en Alcalá de Henares, nia kongresurbo.

Oni povas legi vere interesan artikolon en Esperanto pri Cervantes en la kolombia E-revuo "Andaj Ondoj". Eble ĝi utilis por niaj Kihotaj paĝoj kaj eventoj. Legu en:

<http://www.geocities.com/andajondoj/jan2005/20051-revuo.htm> : "La malfacila vivo de la Lepanta Senmanulo".

### **ESPERANTO AGNOSKITA KIEL LITERATURA LINGVO**

Danke al la aktiveco de Esperanta PEN-Centro, Esperanto estas pli kaj pli agnoskita kiel literatura lingvo. La Portugala PEN invitis kontribui al poezia antologio en okdedo da lingvoj. La editoro, Casimiro de Brito, akceptis poemon de William Auld. El Triesto venis la invito partopreni en la konkurso "Castello di Duino", pri poezio kaj solidareco -- lingvo de la popoloj. La konkurso strebas kupli kulturon kaj solidarecon, altirante la atenton de junaj poetoj al homamaj celoj, tial ĝi estas rezervita al gejunuloj ĝis la 30a jaro. Ĉi-jare, unuafoje, Esperanto estas akceptita inter la verkolingvoj.

La Itala PEN invitis la esperantan partopreni per propra preleganto en internacia konferenco pri la verkistoj en prizono, kadre de la Universitato Ca' Foscari en Venecio, la 3an de majo 2005. Giorgio Silfer proponis prelegi en la itala pri "Armand Su, poeto kaj prizonulo: ĉina vizaĝo, venecia muzo, liriko en Esperanto": lia propono estis akceptita kun granda intereso. La prezidanto de Kultura Esperanto-Centro, estos oficiala gasto de la PEN-Mondkongreso en Bledo, kie li prelegos slovenlingve okaze de la ĉeftema ronda tablo. Giorgio Silfer prelegos franclingve pri "La infana raso" okaze de paralela kongresa kulturprogramo. La dua duono de junio 2005 estas aparte grava por la Centro, ĉar okazos la PEN-mondkongreso en Bledo (Slovenio), 14-21 junio, kaj la kolokvo pri "Esti virino kaj verkistino en la hodiaŭa mondo" en Ĉaudefono (24-27 junio). La ordinara Asembleo de la Esperanta PEN disvolviĝos en unu el la du aranĝoj.

### **ĈU BONA PROPAGANDO?**

En "El País", 2005-02-18, paĝo 8, aperas anonco de Partio "Cultura Natural", sin difinanta kiel "partio anarkista modera, ekologa kaj naturista" (sic), pledanta por blanka voĉdono en la referendumo. Ĝi aperas en iom fuŝa Esperanto kaj hispana lingvoj. Tamen eble estas la unua fojo en kiu nia lingvo, eĉ kun supersignoj, aperas en tiu ĵurnalo. Bedaŭrinde, legantoj sendube ricevis la impreson ke Esperanto estas afero freneza.

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretario, Manolo Parra, deĵoras lunde kaj jaŭde vespere (18,30-21,00h), dum aliaj tagoj vi povas faksi au telefoni al 91 446 80 79 au kontakti rete [admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

**La 64<sup>a</sup> HISPANA ESPERANTO KONGRESO** finfine okazos en Alcalá de Henares, de la 7<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup> de julio de 2005, kun la temo "Donkiĥoto parolas Esperanton". Tial grava parto de ĝia programo estos dediĉita al tiu verko, ĝia esperanta traduko kaj ties tradukinto. Sed 2005 jubileas ankaŭ pro aliaj kialoj. Krome oni festas la Internacian Jaron de Fiziko kaj la centjariĝon de la unua internacia Esperanto-kongreso en Boulogne-sur-Mer. Ankaŭ tiuj eventoj havos lokon en la programo.

La kongresejo estos ĉe Servicio Municipal de Archivo y Biblioteca, Plaza de San Julián, 1, Alcalá de Henares. Tre centra loko, proksime de "Plaza de Cervantes".

Vizitu de tempo al tempo la retejon de HEF ([www.esperanto-es.net](http://www.esperanto-es.net)) por informiĝi pri la programo.

Kongreskotizoj eŭraj	ĝis 31a de majo	ekde la 1a de junio
HEF-ano	30	39
ne HEF-ano	36	45
juna HEF-ano	21	27
juna ne HEF-ano	27	33

Pagu vian kotizon per unu el jenaj kontoj:

**-BBVA: 0182-1252-33-0201517592**

**-UEA: hefb-m**

Sendu la pagpruvilon kun via nomo kaj adreso al la oficejo de HEF.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3<sup>o</sup>-7, Tel. 91 446 80 79.

14-an de Marto, je la 19,00 horo ĉe ATENEO DE MADRID (Prado 21): Prelego de Toño del Barrio pri "Ateneo kaj Esperanto".

La membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid:

**Nova Konto: Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730**

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4<sup>o</sup>B EXT

28005 Madrid